

Dialoga instrutekniko
Claude Gacond, 321-a radioprelego, 1969.12.03 & 06

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La 7-an de septembro ni gvidis en Solothurn seminarion pri la dialogoj en la esperanto-instruado.

A.- La dialoga instru-tekniko havas interesajn avantaĝojn.

Cl.- Ĉar ĝi povas esti uzata kiel riĉigo de la tradicia perlibra instruado, ĝi permesas eviti la unuteknecon.

A.- Ĝi ebligas neŭtraligi kelkajn malfortojn de la tradicia instruado, alportante vivon, kie ofte regas enuo.

Cl.- Ĝi paroligas la lernantojn tuj ekde la unua leciono.

A.- Ĝi kutimigas la lernantojn al situacioj, kiujn ili baldaŭ renkontos, se ili vizitos kunvenon aŭ kongreson.

Cl.- Ĝi transformas la pasivajn lernantojn en aktivaj aktoroj, ĉar ĝi permesas al ĉiuj lernantoj samtempe aktoradi.

A.- Tiu samtempa aktorado malaperigas la tim-refleksojn, ĉar observantoj malestas. La instruisto ne plu korektas individue la lernantojn.

Cl.- Aktorante, la lernantoj akiras lingvajn refleksojn per la tuta korpo.

A.- Ili estas devigataj al tuja parkerado, tiel ili lernas la novajn radikojn en frazoj.

Cl.- Ĉar la dialogoj formas tuton, la ludo de tiu teatraĵeto favoras la ripetadon.

A.- Tiuj parol-ekzercoj, kiuj formas teatraĵeton, entuziasmigas la lernantojn.

Cl.- Ili ripozigas de la libra instruado per kreo de amuzaj paŭzoj.

A.- Sed vi deziras havi kelkajn ekzemplojn de dialogoj. Jen la unua dialogo, kiu estas enkonduko al la instruado de esperanto. Parolas Tom Bel kaj Maria Papilio :

Cl.- *Bonan tagon !*

A.- *Bonan tagon !*

Cl.- *Mi estas Tom Bel. Kiu vi estas ?*

A.- *Mi estas Maria Papilio.*

Cl.- *Ĝis revido !*

A.- *Ĝis revido !*

Cl.- Tute simpla dialogo, ĉu ne ? En ĝi aperas la radikoj : **Unu, a, dialog/o, o, bon/a, n, tag/o, mi, est/i, as, kiu, vi, ĝis, re, vid/i.**

A.- Per ili oni formas la vortojn kaj vortkombinojn : unua, unua dialogo, bono, taga, unua tago, mia, min, mi estas, mi dialogas, kiu dialogas ? kiu dialogo ? kiu tago estas ? via, vin, vi estas, ĝis mi, ĝis vi, kiu vidas min ? vido, vida, revidi, mi revidas vin, ĝis revido !

Cl.- La lernantoj ne tradukas la dialogojn, sed ili kune tradukas tiujn vortojn kaj frazetojn, kiujn oni formas per la novaj radikoj. Estas ekzakte gradigitaj ekzercoj, kiuj evitas la lernadon de izolita formo. Estas gimnastikado, kiu tuj pretigas al la kompreno de la esperanta vortformado.

Dialoga instrutekniko
Claude Gacond, 321-a radioprelego, 1969.12.03 & 06

A.- Por reveni al la dialoga tekniko, ni menciuj ĝiajn limojn. La cerbo asimilas laŭ precizaj ritmoj. Oni ne povas malobei tiujn ritmojn. Do la dialogoj nek devas esti tro longaj, nek devas enkonduki troan nombron da novaj radikoj.

Cl.- Por observi la ritmon de la asimilado, oni devas unue korse reciti la dialogon sen serĉi ĝin kompreni en ĉiuj ĝiaj detaloj. Ĉiuj viroj korse laŭtlege laŭ la rolo de Tom Bel. Ĉiuj virinoj tiun de Maria Papilio.

A.- Poste venas la klarigo de la radikoj per tiuj vort-ekzemploj kaj frazetoj, kiujn vi ĵus aŭdis.

Cl.- Poste la lernantoj formas grupojn, kiuj samtempe dialogas. Kiam la lernantoj alvenas je la fino de la dialogo, ili iras al aliaj kunuloj por rekomenci la dialogon duan, trian, kvaran fojon, tio ĝis kiam ili povas ĝin diri sen la helpo de la skribita teksto.

A.- Tiam la lernantoj eklernas ne plu uzi la nomojn Tom Bel kaj Maria Papilio, sed sian veran nomon. Ili interkonatiĝas unu kun la aliaj.

Cl.- Kiam tiu interkonatiĝo okazis, ili jam asimilis multon. Nun la perlibra instruado povas komenciĝi. Je la fino de la leciono oni revenas al tiu dialogo por ĝin ripeti.

A.- Se tiuj lernantoj ekpartoprenas la grupon vivon, ili jam kapablos saluti : *Bonan tagon ! Ĝis revido !*

Cl.- Plie ili kapablos sin prezenti kaj demandi la nomon de la kunuloj. *Mi estas Tom Bel. Kiu vi estas ?*

A.- Ili lernas frazojn, kiuj rilatas al la situacioj, kiujn ili renkontos.

Cl.- En ĉiu leciono ili ricevos paĝon, unue kun kelkaj facilaj dialogoetoj, poste kun unu sola teksto, kiu estas la daŭrigo de teatraĵeto. Jen ekzemple la dua dialogo : Parolas Tom Bel kaj Karlo Ĝentil :

A.- Tom Bel.- *Ĉu vi estas sinjoro Ĝentil ?*

Cl.- Karlo Ĝentil.- *Jes, mi estas Karlo Ĝentil.*

A.- *Ĉu vi loĝas en Bern?*

Cl.- *Jes, mi loĝas en Bern.*

A.- Per tiu dialogoeto la lernantoj lernas tiujn novajn formojn :

Cl.- du, dua, duo, ĉu, sinjoro, jes, jesa, mi jesas, loĝi, mi loĝas en, ĉu vi vidas min ?

A.- En la tria dialogo parolas Karlo Ĝentil kun Irena Ĉapelo. Aŭdu :

Cl.- *Ĉu vi estas sinjorino Papilio ?*

A.- *Ne, mi ne estas sinjorino Papilio, sed Irena Ĉapelo.*

Cl.- *Ho pardonu ! Ĉu vi loĝas en Berlin ?*

A.- *Jes, mi loĝas en Berlin.*

Cl.- Per tiu tria dialogo la lernantoj lernas la formojn :

A.- tri, tria, trio, in, sinjorino, ino, ina, ne, nea, ĉu vi neas ?

Cl.- Kaj jen la kvara dialogo.

A.- Irena Ĉapelo.- *Ĉu vi estas fraŭlino Ĉagreno ?*

Dialoga instrutekniko
Claude Gacond, 321-a radioprelego, 1969.12.03 & 06

Cl.- Julia Ĉagreno.- *Ne, mi ne estas fraŭlino, sed sinjorino Julia Ĉagreno.*

A.- Irena Ĉapelo.- *Ho pardonu ! Ĉu vi loĝas en Madrid ?*

Cl.- Julia Ĉagreno.- *Ne, mi ne loĝas en Madrid, sed en Roma.*

A.- Per tiu kvara dialogeto la lernantoj lernas la formojn :

Cl.- kvar, kvara, kvaro, fraŭlo, fraŭlino.

A.- La venontan semajnon ni reparolos pri la dialogoj en la esperanto-instruado.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-